Action item for Bill H.: send Alex M. the link to make sure that he is able to see board communications.

Discussed more participation in making videos. Alex encouraged the board members to appear in future announcement videos, both to vary up whose face appears on the channel all the time and to slowly improve the quality of videos made by other directors through practice and trial and error.

Appendix: President's Report

The Publicity Committee

William Morton is steering the Publicity Committee into a focused subset of our overall publicity vision. It is inspiring to see the attention to detail that the committee is giving attention to. The Publicity Committee is focusing on making Esperanto known to the non-Esperanto public. Publicity for the membership campaign will remain with the Membership Committee. Publicity for fundraising will remain with the finance and resource team. The Publicity Committee intends to meet weekly. The team feels driven to get these messages right, so that we can attract new and genuine participants into the Esperanto community in the United States.

Kudos to Vilêjo Morton for this important groundbreaking effort.

SIGs

Special Interest Groups need to launch within a few days if we are to announce the launch in the coming issue of *Usona Esperantisto*. What steps remain?

1. Do we have all the pieces defined? 2. Do we have the

procedures defined? 3. Do we have the spreadsheet that will be used to drive the webpage? 4. Do we have the webpage? 5. How soon can we do a launch?

Video Contest

Kudos to Alex Miller, the judges, and the video team. We look forward to 2022.

Delegation, Cooperation, Timing, and Patience with one another

I want to thank this board of directors for the patience we show for one another. Even when we are on the same page with great common visions, we sometimes differ on timing. The frustrations teach us patience, which we have certainly showed for one another. When one of us has a dream of what should happen next, we sometimes think it should happen right then, especially when the ball is in somebody

else's court. All this cooperation and communication is something we realize we are getting better at, step by step, especially on Slack.

We are getting better at delegating tasks to committees, most recently to the Membership Committee and the Publicity Committee. We do trusted work. That means we trust our committees to do faithful work and that we ourselves in the Board of Directors do work that our members can depend on.

Thank you, Fred, Tim B., Tim R., Alex, Charlotte, Jane, and Brian for your good work. Special thanks go out to Hoss for the excellent issues of *Usona Esperantisto*, and to Dave Beck for most excellently fulfilling the responsibilities of Treasurer.

Amike, filipo
Phil Dorcas, president, Esperanto USA, filipo@grupoj.org

Kiel valoras partopreni en ILEI kaj UEA?

leterkesto • Mark HAMME

Kiam mi esperantistiĝis, bonkora esperantisto donis al mi jarlibron, kaj mi skribis al UEA kaj ILEI multfoje pri mia deziro iĝi diplomita instruisto de Esperanto. Sed ili neniam respondis! Do mi daŭre skribis al la estroj ekde tiam ĝis nun, sed ili neniam respondas! Mi telefonis al multaj estroj de diversaj fakaj grupoj, sed ili neniam helpis min pri tio, kvankam ili helpas al senmonuloj pri ekzamenado kaj diplomiĝo. Mi skribis al ĉiu (eble 100) landaj asocioj, serĉante plumamikojn, sed nur 3% respondis. Cetere, nur 5% de la fakaj grupoj respondis. Ŝajne ILEI, UEA, kaj iliaj estroj montras nerespondecan ekzemplon.



Do, kiam mi finfine akiris iomete da mono, mi membriĝis en ILEI kaj UEA (en Aprilo, pere de Esperanto-USA), ĉar alimaniere mi ne povintus aliĝi,

ĉar ili neniam respondas. Sed ILEI neniam sendis ion ajn al mi, kaj mi ne scias, kiel kontakti ilin sen la sama nerespondo. Intertempe la revuoj de UEA fieras pri helpo al senmonuloj pri ekzamenado kaj la “Fondaĵo Canuto” – mi povintus partopreni en tio kiam mi estis senmona, sed partopreno estas nebla, ĉar oni NENIAM respondas.

Do, mi forĵetis monon al ILEI, ĉar neniu kontaktis min, nek letere nek revue. Ĉu ekzistas iu, kiu: 1) helpus min pri kursmaterialoj kaj papera ekzameno, ĉar mi ne havas aliron al Interreto? Mi pagus pli da mono por fari tion! aŭ 2) revenigus mian monon?

Kie estas la “interna ideo” inter la plejparto de la esperantistoj, la ĉefaj kaj subaj organizaĵoj, kaj iliaj membroj? Krom helpo fare de kelkaj individuoj, mi ne vidas tion. Ĉu miaj lernantoj spertos la samajn problemojn?

Oni povas skribi al Mark ĉe lia poŝtadreso: Mark Hamme #33391-379 / USP / P.O. Box 24450 / Tucson AZ / 85734

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <<https://bit.ly/3LzL1LK>> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2021-08-02	BOA CC 7572	10.00	Internet Access	ttt website
2021-08-02	BOA CC 7572	25.95	Internet Access	Dreamhost
2021-08-02	BOA CC 7572	27.14	Telephone/Fax	800 number
2021-08-02	BOA CC 7572	27.38	Telephone/Fax	AT&T
2021-08-02	BOA CC 7572	40.00	Credit Card Expenses	Payflow
2021-08-05	ENDICIA	83.27	Catalog Service Postage	
2021-08-05	ENDICIA	216.73	Bulteno - Print & Post	2021:3
2021-08-05	ONLINELABELS	10.00	Bulteno - Print & Post	labels for newsletter
2021-08-12	Federal & State Payroll Taxes	185.97	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2021-08-12	Federal & State Payroll Taxes	715.60	Salaries	Employee taxes
2021-08-12	HARRISWB	1715.38	Salaries	payroll
2021-08-16	ENDICIA	15.95	Catalog Service Postage	monthly charge
2021-08-16	UPS	17.45	Cost of Catalog Sales	packing material
2021-08-20	ADP	55.36	Payroll Fees	fees
2021-08-20	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2021-08-31	PAYPAL	54.75	Credit Card Expenses	Fees
2021-09-03	BOA CC 7572	10.95	Internet Access	Dreamhost
2021-09-03	BOA CC 7572	20.00	Internet Access	ttt website
2021-09-03	BOA CC 7572	27.14	Telephone/Fax	800 number
2021-09-03	BOA CC 7572	27.38	Telephone/Fax	AT&T
2021-09-03	BOA CC 7572	40.00	Credit Card Expenses	Payflow
2021-09-03	BOA CC 7572	44.99	Office Expenses	AVIRA anit-virus
2021-09-06	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2021-09-14	ENDICIA	15.95	Catalog Service Postage	monthly charge
2021-09-14	UEA-V	5000.00	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 4204.96 EUR
2021-09-15	Federal & State Payroll Taxes	185.97	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2021-09-15	Federal & State Payroll Taxes	715.60	Salaries	Employee taxes
2021-09-15	HARRISWB	1715.38	Salaries	payroll
2021-09-18	ADP	55.36	Payroll Fees	fees
2021-09-22	ENDICIA	300.00	Catalog Service Postage	postage
2021-09-24	UEA-V	4000.00	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 3392.31 EUR
2021-09-30	BOA CC 7572	10.95	Internet Access	Dreamhost
2021-09-30	BOA CC 7572	27.14	Telephone/Fax	800 number
2021-09-30	BOA CC 7572	27.38	Telephone/Fax	AT&T
2021-09-30	BOA CC 7572	31.65	Member Mailing Expenses	9x12 envelopes for memberlist
2021-09-30	BOA CC 7572	36.06	Office Expenses	various office supplies
2021-09-30	BOA CC 7572	40.00	Credit Card Expenses	Payflow
2021-09-30	RAND PRINTING	252.15	Bulteno - Print & Post	UE 2021:4
2021-09-30	PAYPAL	44.34	Credit Card Expenses	Fees

Esperantaj libroj en via publika biblioteko

informado • Timoteo RICE



Laŭ la sistemo Dewey, libroj pri lingvo troviĝas en la fako 400. Pli precize, libroj pri lingvoj artefaritaj estas en la fakero 490. Se ekzistas libroj pri Esperanto en la publika biblioteko plej proksima al vi, ili eble estas la lastaj en sia breto.

Se via publika biblioteko ne havas librojn pri Esperanto, kion vi povas fari?

Eble via unua impulso estas akiri librojn kaj donaci ilin al la biblioteko. Tio helpas la bibliotekon, sed eble la libroj efektive ne metiĝos en la libraron.

Kial? Ĉiu biblioteko publika strebas krei ekvilibron inter la volo kaj bezonoj de la komunumo. Kaj ĉiu biblioteko havas limigitan spacon kaj monon por fari tion. Biblioteko kun nur ofte petataj materialoj (bibliotekoj enhavas pli ol librojn!) malhavas librojn pri matematiko, scienco, historio nefama, ktp. Biblioteko kiu ne havas famajn romanojn kaj romantikaĵojn, sed nur kelkajn librojn pri komplotteorioj, estus tute ignorata de preskaŭ ĉiuj.

Kio okazas al materialo donacita sed ne pruntebligita?

Por multaj publikaj bibliotekoj ekzistas helporganizoj

neprofitcelaj kun nomoj kiel “Amikoj de la biblioteko _____”. Kiam biblioteko ne plu bezonas materialojn, la Amikoj vendas ilin ĉe butiketo aŭ evento.

Por ke libro ne tuj vendiĝu, anstataŭ donaci libron, petu ke la biblioteko akiru ĝin.

Se vi serĉas en la retejo de via publika biblioteko, eble estas maniero peti materialon.

Bibliotekoj publikaj estas kaj avancemaj kaj konservemaj pri nova materialo, do tio, kion vi petas estu recenzita kaj akirebla.

Ne malesperu se la unua peto ne sukcesas. Repetu en la venonta jaro. Mi petis dum kvin jaroj antaŭ ol la biblioteko *kie mi laboras* akiris librojn pri Esperanto.

Libroj el papero ne estas la sola ebleco. Eble bitlibroj neniam tute anstataŭigos paperajn librojn, sed ili estas tre utilaj. Antaŭ ol ĝi akiris freŝajn librojn pri Esperanto, mia biblioteko almenaŭ faciligis legadon de bitlibroj de *Project Gutenberg*.

Mi konsilas peti la librojn **Complete Esperanto** <<https://bit.ly/30vMAVw>> de Tim OWEN (ISBN 9781473669185) kaj **English-Esperanto-English Dictionary** <<https://bit.ly/3lKuPKc>> de John C. WELLS (ISBN 9781595691491).



Timoteo RICE

Timoteo estas Direktoro kaj Rajtprotektanto (angle, *Ombudsman*) de Esperanto-USA. Li loĝas en Oklahomo.

<gartherio@gmail.com>


Eterna

mikronovelo • Jorge Rafael NOGUERAS

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj estu precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis tre juna, mi hazarde malkovris, ke mi kapablas transformiĝi en ion ajn.

Unue mi iĝis hundo, ĉar la vivo de mia dorlotbesto ŝajnis al mi tre agrabla. Tamen, kiam post nur deko da jaroj mi komencis kadukiĝi, mi decidis ŝanĝiĝi en pli longvivan beston: testudon. Mia enkarapaca vivo longe daŭris, sed ankaŭ ĝi, finfine, komencis



estingiĝi, do mi decidis fariĝi sekvojo. Mi pace arbis dum jarcentoj, sed mi finfine eksentis miajn branĉojn kraki ekrompiĝe. Kiel trompi la morton?

Finfine mi decidis transformiĝi en ĉi tiujn vortojn, kiujn vi nun legas. Nun, mi estas eterna.



Jorge Rafael NOGUERAS

Rafa ŝatas legi (kaj foje eĉ verki!) en Esperanto, estas “onklo” en la programo *Ekparolu!*, instruas la lingvon kadre de la Nord-Londona

Esperanto-klubo, kaj estas parto de la teamo kiu prizorgas la Esperanto-kurson en Duolingo (kie li ĉefe voĉlegas la frazojn).

<rafaeln@alum.mit.edu>

Kolofono

Redaktoro/Editor: Hoss FIROOZNIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitaĵojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.en>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.


You don't have to be Sun freakin' Tzu

traduku! • HOSS FIROOZNIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.

Post longa paŭzo ni revenas al la teksto el № 2021:3, eltiraĵo el la sciencfikciaĵo *World War Z* de Max BROOKS.

Partoprenis en la tradukado sep bravuloj, inkluzive de kelkaj novuloj: AJ, BA, BS, CH, DH, MH, kaj SB. Mi kore dankas al ĉiuj, kaj esperas, ke ili trovis la ekzercon lerniga ... aŭ almenaŭ ĝuinda!



La sciencfikcia romano *World War Z* (2006) de Max BROOKS.

La romano konsistas el intervjuoj kun postvivintoj de apokalipsa milito kontraŭ zombia hordo. Same kiel en la antaŭa defio de Cory DOCTOROW, la lingvaĵo estas tia de “veraj homoj”, plena je familiaraj, modernaj, kaj ofte krudaj idiomaĵoj.

Kelkaj legantoj ŝajnis iom ŝokitaj pro la fivortoj, kaj mi kore pardonpetas al tiuj, kiuj ofendiĝis. Kutime mi ja provas eviti maldecaĵojn, sed ĉi-kaze temis pri riĉaj, aktualaj esprimoj en la angla lingvo, do ideala temo por tradukdefio. Ekde nun, tamen, anglalingvaj fivortoj aperos “kaŝitaj” kiel en multaj anglalingvaj gazetoj – per enmeto de steletoj.

Interesaj vortoj kaj parolturnoj

- *the old **adage** that armies perfect the art ...* — Multaj tradukintoj redonis *proverbon*. Tamen proverbo estas konciza esprimo de popola saĝo, kaj ĉi-kaze la saĝo ŝajnas pli faka ol popola. Aliaj tradukintoj proponis la pli ĝeneralajn *diraĵon* kaj *onidiron*. Ambaŭ bonaj, sed kio pri *aksiomo*?
- *I think that's a **big ol'** sack of it* — Duoble familiara esprimo, eĉ ne rekte nomanta la

enhavon de la metafora sako. Kompreneble, la celita ideo estas “sensencaĵo, mensogo, stultaĵo”, ktp. La aliroj de niaj tradukintoj plejparte dividiĝis en tri grupojn:

Ĉe unu poluso, oni provis fidele reteni la metaforon, elektante pli-malpli rektajn redonojn: *grandega amaso* (AJ), *amasego de fekaĵo* (CH), kaj la tre elvoka *haladza sako putraĵplena* (SB). Sed ĉu la metaforo estas sufiĉe konata por esti internacie komprenebla?

Alipoluse oni proponis purajn klarigojn: *sensence* (BA), kaj eĉ *fi-sensencaĵo* (DH) – eble por reteni iom de la maldececo de la anglalingva esprimo.

Meze inter la du aliroj (ekvatore?) oni provis ne nur reteni la metaforon, sed ankaŭ klarigi ĝin: *valoras sakon da ekskremento* (MH) kaj la bele aliteracia *sakpleno da sensencaĵo* (BS).

- *one **class-A, gold-standard clusterf*ck*** — Unue ni traktu la adjektivojn, kiuj ambaŭ emfazas la saman ideon: “la plej bona, la plej elstara.” Oni pravigeble proponis *unuvaranga*, *unuaklasa*, *altkvalitaj*, *supera*, kaj *modela*. Kelkaj volis reteni *gold-standard* per la laŭvortaj *ornorma* kaj *orbaza*, sed mi dubas, ĉu tiuj estas internacie klaraj.

Pri la substantivo: indas rimarki, ke temas ne nur pri maldecaĵo, sed termino kun preciza signifo, kiu subtile diferencigas ĝin de similaj vortoj kiel *sh*tshow* kaj *snaflu*.¹ Mallonge, ĝi nomas ege fuŝitan entreprenon rezulte de nekompetentaj decidoj. La vorto aparte konvenas en milita kunteksto, ĉar ĝi supozeble alprenis sian nunan signifon dum la usona milito en Vjetnamujo.

BS proponis la kreeman *fubaraĵo* (ŝajne de la anglalingva akronimo *fubar*, alia militdevena vorto). CH amuze proponis *volapukaĵoj*. Aliaj proponis *fikfiasko*, *fekaĵego*, *amasa kolizio*, kaj *fikaoso*. BA elektis klarigi la tutan esprimon per simpla, komprenebla lingvaĵo:

estis tute maltaŭgaj.

- **something that rolled off an assembly line** — bildiga priskribo de fizikaj armiloj por distingi ilin disde timo, pure emocia “armilo”. Denove, la aliroj dividiĝis inter klarigaj revortigoj unuflanke, ekz. *fabrikiĝis industriskale, armilo produktita en fabriko*, kaj pli-malpli laŭvortaj redonoj aliflanke, ekz. *io, kiu ruliĝis de muntoĉeno*. Kvankam muntoĉenoj ne estas ĉiutagaj aferoj en Esperantujo, eble indas konservi la mensan bildon, kiun ĝi pentras. Ĉu eble *io, kion oni muntis en fabriko*?
- *You don't have to be Sun freakin Tzu to know ...* — bela ekzemplo de *infikso*, tre malofta fenomeno en la angla. Simila al prefikso aŭ sufikso, infikso estas aldona morfemo – sed ĝi enmetiĝas *interne* de la vorto (aŭ ĉi-kaze, nomo). Tiu ĉi infikso estas eŭfemisma sakraĵo, sed efektive ĝi ne mallaŭdas aŭ insultas. Ĝi simple emfazas. Komparu ekzemple *fan-freakin-tastic* kaj *un-freakin-believable*.

La reguloj por emfazaj infiksoj en la angla estas surprize striktaj. Se vi volas ekscii, kial oni ne diras ekzemple **fanta-freakin-stic*, ekzistas detala klarigo de lingvosciencisto John MCCARTHY.²

La tradukintoj plejparte provis konservi la infikson, ekzemple per *Sun diable Tzu, Sun-feka-Tzu*, ks. Tamen laŭ mia scio, tia uzo restas nekonata en Esperanto. Do en la sinteza teksto mi uzis *moŝto*, proponitan de BS, sed en ne-infiksa formo: *oni ne devas esti moŝto kiel Sun Tzu*.
- *it's about scaring him enough to call it a day* — *rezignu; adiaŭu; ke la batalado povas ĉesi*. SB proponis la zamenhofan proverbon *Farita via farno, nun adiaŭ, mia kara! Kio pri cedu?*
- **break their spirit** — Preskaŭ ĉiuj provis konservi la esprimon, ekzemple per *rompi/difekti la spiriton/animon*. Sed mi dubas, ĉu la *spirit* en tiu esprimo vere rilatas al psiko, karaktero, aŭ malmateriala substanco.

Temas pri kuraĝo, ĉu ne? Pri volo. BA bone klarigis la ideon alivorte per *detruo ilian esperon*.

- **Shock and Awe** — milita taktiko de rapida venkado. La senco de *shock* sufiĉe similas al *ŝoko*, sed la plursenceco de *awe* kaŭzis malkonsenton inter la tradukintoj. Kelkaj proponis *miro* – kiu kutime estus bonega traduko – sed ĉi-kaze *awe* havas kromsencan de timo, kiu ŝajne mankas en *miro*. Aliaj proponoj uzis *teruro*, *timigo*, kaj la tre konvenan *impono*, kiun PIV difinas tiel: “kaŭzi tian respektan admiron, ke oni emas cedi, aŭ obei ...”
- *(it) boomeranged back in our faces* — jam ekzistas *bumerango* en Esperanto, do kelkaj verbis ĝin. Aliaj elektis la pli fundamentan *resaltis*. MH proponis *retropafis*, kaj BA klarigis la esprimon per *(ĝi) venkis nin*.
- **restored confidence to the American people** — okazis iom da konfuzo pri la pluraj sencoj de *confidence*. La ideo en la originala frazo ŝajnas esti “sento de sekureco (pri la efikeco de la armeo)”. Do, *fido*. La vorto *konfidenco* estas falsa amiko, ĉar ĝi nomas “komunikon de privata aŭ sekreta informo”. Ankaŭ *memfido* ne tute taŭgas, ĉar la popolo ne rehavis fidon pri si mem. Kelkaj proponis *konfido*, kiu eble taŭgas. Plej plaĉas al mi la simpla *redonis fidon al la usona popolo* (CH).
- *we practically told them to kiss their ass goodbye* — Laŭvorte, la usonangla *ass* nomas pugon, sed ĝi partoprenas en multaj idiomaĵoj kun mirinde diversaj sencoj. Interalie oni povas *bust one's ass* (laboregi, peni), *haul ass* (rapidi), *get one's ass into gear* (hasti, eki), *not give a rat's ass* (neniel zorgi pri), kaj eĉ *bet one's ass* (esti ege certa).

Simile, la esprimo *kiss one's ass goodbye* ne vere temas pri adiaŭa kiso al (kaj perdo de!) la propra pugo; temas pri konsciigo de iu pri sia baldaŭa pereco. Kelkaj tradukintoj provis konservi la metaforon laŭvorte, sed ĉu ĝi estas internacie komprenebla? Plaĉas al mi, kiel MH nur parte retenis la metaforon per la malpli

enigma ili adiaŭu sin. BA klarigis la aferon alivorte, proponante *tute senesperigis ilin*. Nu, kiun aliron vi preferas?

La “sinteza” traduko

Jen provo krei sintezan tekston uzante la proponojn de niaj tradukintoj kun kelkaj aldonoj.

Historiistoj emas diri, ke Jonkerso reprezentis “katastrofan fiaskon de la moderna militaparato,” ke ĝi pruvis la malnovan aksiomon, ke armeoj perfektigas sin por la antaŭa milito ĝustatempe por alveno de la sekva.

Laŭ mi, tio estas sakpleno da sensencaĵo. Jes, ni ne estis preparitaj. Niaj iloj, nia trejnado – ĉio estis la plej supera, unuaranga fuŝaĵego. Sed la armilo vere misfunkciinta ne estas io, kion oni muntis en fabriko. Ĝi estas tiel malnova, kiel ... mi ne scias. Nu, eble kiel militado mem. Ĝi estas timo, bubo – nur timo. Kaj oni ne devas esti moŝto Sun Tzu por scii, ke vera batalado ne temas pri mortigo aŭ eĉ vundado de la malamiko – temas pri timigo sufiĉe profunda, ke li cedas. Rompi la volon de la malamiko, jen la celo de ĉiu sukcesa armeo – ĉu per triba vizaĝfarbo, aŭ “blitzkrieg” aŭ ... kiel oni nomis ĝin en la Golfa Milito? Ĉu “Ŝoko kaj Impono”?

Nu, kio se la malamiko sentas nek ŝokon nek imponon? Ne nur ĉar li rifuzas, sed ĉar li biologie ne kapablas?! Jen kio okazis tiun tagon apud Novjorkurbo. Nia malsukceso ŝoki kaj imponi Zoĉjon resaltis en niajn vizaĝojn. Ili tute ne timas! Ne gravas, kion ni faros. Ne gravas, kiom ni mortigos. Ili neniam, neniam timos!

Jonkerso devintus esti la tago, kiam ni redonis fidon al la usona popolo. Anstataŭe, ni efektive diris, ke ili adiaŭu sin.

Por tiuj, kiuj volas kompari la tradukojn kaj vidi ĉiujn detalojn, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de la proponoj.



La nova defio

Denove ni restas ĉe sciencfikcio, sed de vere alia stilo. Jen kelkaj alineoj adaptitaj el la klasika novelo *Transience* de Arthur C. CLARKE, unue aperinta en *Startling Stories* en Julio, 1949.

The forest, which came almost to the edge of the beach, climbed away into the distance up the flanks of the low, misty hills. Underfoot, the sand was coarse and mixed with myriads of broken shells. Here and there the retreating tide had left long streamers of weed trailed across the beach. The rain, which seldom ceased, had for the moment passed inland, but ever and again large, angry drops would beat tiny craters in the sand.

It was hot and sultry, for the war between sun and rain was neverending. The trees grew everywhere, softening the contours of the land so that the hills blended smoothly into each other. Only in one place could the bare, uncovered rock be seen, where long ago some fault had weakened the foundations of the hills, so that for a mile or more the sky line fell sharply away, drooping down to the sea like a broken wing.

Moving with the cautious alertness of a wild animal, the child came through the stunted trees at the forest's edge. His face, brutish though it was, might have almost passed in human society, but the eyes would have betrayed him.

Piednotoj

1. **Purtill, Corinne.** “The difference between a snafu, a sh*tshow, and a clusterf*ck”, *Quartz*, March 16, 2018 <<https://bit.ly/3GKeahA>>.
2. **McCarthy, John J.** “Prosodic Structure and Expletive Infixation”, *Language*, Vol. 58, No. 3 (Sep., 1982), pp. 574-590 <<http://www.jstor.org/stable/413849>>

La redakcio (trovu ĝian adreson en la kolofono) akceptos vian proponon **ĝis la 15-a de Februaro**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ ne volas. Sed ĉiukaze bonvolu sendi **nur unu** proponon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

La terura ekkrio

el la arĥivo • Henry William HETZEL

Dankon denove al Kinen CARVALA pro lia trovo kaj provlegado de la jena artikolo en niaj enskanitaj arĥivoj. Ĝi unue eldoniĝis antaŭ 104 jaroj en *Amerika Esperantisto* (Dec., 1917). La artikolon oni atribuis al “H. W. H.”, do supozeble temas pri **Henry William HETZEL** <https://eo.wikipedia.org/wiki/Henry_William_Hetzel>.

Mi ofte aŭdas, kiam mi finas argumenton por Esperanto, “Ho jes! La ideo estas bona kaj Esperanto estus alpreninda afero se ĉiu persono ĝin alprenus.” Tio ĉi min ridetigas kaj mi ĉiam rememoras fabelon, kiun mi ie aŭdis, – aŭ eble mi nur ĝin elpensis; – ne estas grave. Jen ĝi:



Antaŭ multaj, multaj centjaroj, dum tempo nun tute forgesita, estis la insulo Toruno en la mezo de la Suda Maro. Ne demandu al mi, kie precize estas aŭ estis tiu nun nekonata insulo. Eble ĝi jam delonge malaperis en la maron, aŭ eĉ eble ĝi neniam ekzistis; – ne tro demandu. Tamen, iam dum unu el la plej prosperaj periodoj en la historio de Toruno regis la saĝa Reĝo Hurafo. Mi diras “saĝa” ĉar neniu en la tuta insula reĝlando havis pli da scio pri la profundaĵoj de la artoj, sciencoj, literaturoj kaj lingvoj ol la Reĝo mem. Ne nur li mem estis tre instruita, sed lia plej arda pasio estis instigi la saman kleracon al aliaj. Do ne estu surprizita, kiam mi diras, ke la ĉefaj elspezoj de la rega trezorejo estis por lernejoj, bibliotekoj kaj sciencaj eksperimentadoj. Precipe, la studo de astronomio lin allogis, kaj nature per observatorioj

kaj teleskopoj li kaj liaj fidelaj regatoj multe okupiĝis.

Unu tagon, kiam la Reĝo Hurafo estis en la Reĝa Biblioteko leganta volumon pri la luno, subite al lia cerbo ekvenis la ideo, “Kvankam la luno estas distance multajn milojn da mejloj, – tro malproksima por ia facila interparolo inter la loĝantoj de nia najbara planedeto kaj ni mondanoj – eble se ni farus sufiĉe grandan bruon tie ĉi, la lunanoj ĝin aŭdante almenaŭ scius, ke la mondo nia ne estas senhoma.”

Tre bonega ekpenso! La sekvanta tago, laŭ la ordono de la Reĝo, kurieroj kaj heroldoj trakuris la landon proklamante, ke ĉiu regato nepre kunvenu en la mezo de la insulo por kunagi en la kriego, kiu certe atingos la malproksiman lunon. Tie, sur la Heruga Plataĵo je la tago elektita, staris la tuta loĝantaro de la reĝlando, ĉiu persono preta por fari la teruran ekkrimon.

En la centro de la atendanta popolamaso staris la Ĉefministro kaj, kiam li per suprenlevita oficbastonetito donis la signalon por fari la laŭtegan bruon – kio okazis? Ĉu ŝajna tertremo frapis la insulon? Aŭ ĉu la oreloj de la ĉeestantoj estis fenditaj pro la terura ekkrio? Ne, ĉar mi estas veramulo mi devas diri al vi nur la bedaŭrindan fakton. Nenia bruoj okazis; ne eĉ unu murmureto oni aŭdis. Ĉiu persono nur silente atentis la bruegon, kiun li atendis, ke la aliaj estis farontaj.

Ho ve! Tiel multe da homoj en tiu ĉi plibonigebla mondo estas pretaj por kunlabori nur post kiam ĉiu el la aliaj faros la komencon!

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵo de “Awesome Satyr”.